

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KIUŜIA ESPERANTO-LIGO ESPERANTO-LIGO de TYŬGOKU kaj SIKOKU

La Movado

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KIUŜIA ESPERANTO-LIGO ESPERANTO-LIGO de TYŬGOKU kaj SIKOKU

Fondita en 1951 N-ro 832 junio 2020

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu, 561-0802

KJUŜIA ESPERANTO-LIGO
2-190, Sisaido, Tarami-tyô, Isahaya-si, Nagasaki, 859-0407,
MORIWAKI Yasumasa

ESPERANTO-LIGO de TYŬGOKU kaj SIKOKU
Kannonmen 14-1, Kusiki, Kitanada-tyô, Naruto-si,
Tokusima-ken, 771-0371, KITANI Tomoko

ENHAVO

Ĝemeliĝis Zelkovo kaj Magnolio ... ZHANG Changsheng 1-2	
各地のエスペラント大会延期など	1
Kurantaj Vortoj (医療崩壊、ほか)	2
楽しい作文教室 (106)	塚本 猛 3
Kajero Libervola: Provante esprimi malfacilajn aferojn facile — Pri plago	TAKEMORI Hirotoŝi 4
Duolingo 日本語版エスペラントコースの実現に向けてご協力ください	福田 誠 5
対訳: 源氏物語 第21帖 少女 (3) ... 紫式部 /belmonto 6-7	
関西エスペラント大会延期のお知らせ	8
初心者のための語尾なし単語の使い方(88) ... 相川 節子 8	
WEB サイト拝見 (4): かって「芦屋エスペラント会」があった	編集部 9
書評『日本エスペラント運動の裏街道を散歩する』	伊藤 俊彦 10
楽譜: Pluvas longe(雨) ... 北原白秋/弘田龍太郎/島谷剛 11	
Epidemio iras tra la mondo	AIKAWA Setuko 12-13
La Movado: 読み聞かせボランティア活動	13
Salono: Mesaĝo el Ĉeĥio (EGAWA Harukuni)	13
Vortkruca enigmo / 作文教室成績	14
KLEG事務局だより / Mikspoto / 作文教室課題	15
編集ノート	16

Ĝemeliĝis Zelkovo kaj Magnolio

第68回関西エスペラント大会に高槻の友好都市常州市(中国)から招待予定の張常生さんのご挨拶を掲載いたします。なお関西エスペラント大会は6月から、11月に延期になりました。

Zelkovo kaj Magnolio estas arbnomoj. Tiuj Zelkovo kaj Magnolio ankaŭ estas la simboloj de urboj respektive de *Takatuki* en Japanio kaj *Changzhou* en Ĉinio. De 1988 *Changzhou* havas ĝemelan rilaton kun *Takatuki*. Aparte menciindas, ke nia asocio *Changzhou*-a Esperanto-Asocio (CZEA) jam ĝemeliĝis kun Esperanto-Societo en *Takatuki* (EST) en 1986, du jarojn pli frue ol kiam ambaŭ urbestroj oficiale subskribis la kontrakton de la ĝemelaj urboj.

En *Changzhou*(常州), sudorienta Ĉinio, inter ĉinaj urbegoj *Nanjing*(南京) kaj *Shanghai*(上海) laŭ trajnolinio, oni fondis CZEA-n en 1985, tio instigis multe da junuloj malfermi pordon al la mondo post reformado kaj malfermo de Ĉinio. Ellerninte fremdlingvojn inkluzive

ZHANG Changsheng (Changzhou en Ĉinio)

Esperanton ambiciaj junuloj sopire kaj furioze sorbis la informojn, kiuj okazis ekstere de Ĉinio. La informo de la fondiĝo disvastiĝis per novaĵoj de Ĉina Radio Internacia (ĈRI).

Japanaj esperantistoj, kiuj ankaŭ urĝe scivolis Esperanto-movadon en Ĉinio, kaptis la novaĵon. Inter ili estis s-ro *Takeuti Yosikazu*, kiu estis ĝenerala sekretario de EST kaj ankaŭ estis ĉefsekretario de Amikeca Asocio inter Ĉinio kaj Japanio en *Takatuki* siatempe.

各地のエスペラント大会延期など

◎第68回関西エスペラント大会は、新型コロナウイルスの影響により6月開催を延期し11月14日(土)、15日(日)に開催することになりました。詳しくは、8ページをご覧ください。

◎九州エスペラント大会は5月開催は取りやめ。

◎世界エスペラント大会(カナダ・モントリオール)は2021年北アイルランド・ベルファストの次の2022年へ延期になりました。

Aŭdinte tion lia edzino, s-ino *Takeuti Tomiko*, nia kompatinda kaj estimata amikino, kiu ankaŭ estis unu el la plej fidelaj aŭskultantoj de ĈRI, tuj sin turnis al Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kun la peto ke ĝi sciigu al ŝi la adreson de iniciatintoj de CZEA. Baldaŭ ŝi ricevis la unuan leteron de s-ro *Zhang Zhenzhi*, la unua prezidanto de CZEA. Li estis jam pli ol 70-jara veterana esperantisto, kiu sin dediĉis por Esperanto eĉ en la plej severaj cirkonstancoj dum la batalado kontraŭ la japanaj agresantoj. “Ni metu la idealon de Verda Majo* sur la bazo de niaj estontaj kunlaboroj,” li skribis en sia unua mesaĝo. Tio profunde konkordigis la idealojn de samideanoj en *Takatuki*. Tiele komenciĝis niaj ĝemelaj aferoj.

S-ro *Zhang Zhenzhi* tiam estis vicestro de la Pedagogia Kolegio de *Changzhou*, kie sidis la oficejo de CZEA, samtempe la plej granda parto de la membroj de CZEA estis lernantoj kaj lernintoj en la kolegio kaj ili disposteniĝos en diversgradaj lernejoj. Ĉar ankaŭ EST havis kelkajn instruistojn kiel siajn membrojn, ni do decidis, ke ni unue helpu la lernejajn geknabojn de ambaŭ urboj amikiĝi inter si per Esperanto. En novembro de 1986 la unuaj leteroj de geknaboj de Elementa Lernejo *Tunoe* en *Takatuki* estis senditaj al tiuj de Elementa Lernejo *Dongfang* en *Changzhou* kun Esperanta traduko. Kvankam la korespondado ne daŭris longe, oni tamen ne ĉesis teni la amikan torĉon de la lernejoj. En 1987, pro translokiĝo de samideana instruisto, la rolon prenis en la japana flanko Elementa Lernejo *Yosumi*, kies ĉefinstruisto estis *Ukita Masaharu*, la nuna prezidanto de EST. En 1987 kiam nia vicurbestro *Chen Hongchang* vizitis al *Takatuki*, la flago kun la ĉina vorto AMIKECO donacita de Elementa Lernejo *Dongfang* estis sendita al Lernejo *Yosumi* per la urbestro de *Takatuki*. La lernejoj *Dongfang* kaj *Yosumi* oficiale ĝemeliĝis dank’ al la klopodo de la lokaj Esperanto-organizaĵoj.

2020.6

La 5-6an de junio 1988 okazis en *Takatuki* la 36a Kongreso de Esperantistoj en Kansajo. Invitite de EST nia asocio sendis al la kongreso la triopan delegacion kiu konsistis el s-ro *Yue Deben*, estro de Esperanto-Amika Asocio de *Changzhou*, s-ro *Zhang Zhenzhi* kaj mi. Mi tiam estis ĝenerala sekretario de CZEA kaj instruisto de *Dongfang* kiel rekompenco de mia kontribuo de amikecaj lernejoj. Post la kongreso ni delegitoj triope restis 10 tagojn en *Takatuki* kaj vizitis la ĝemelan lernejon. Tiu evento estis signifoplena ne nur por ambaŭ ĝemelaj lernejoj, sed ankaŭ por la Esperantomovado en ambaŭ urboj. Dank’ al niaj amikecaj kunlaboradoj ambaŭ magistratoj subtenis nian vojaĝon.

Post tiu vizito mi ankoraŭ ricevis du invitojn kaj vizitis al *Takatuki* kiel prezidanto de CZEA, sume tri fojojn.

Naskiĝis Esperanto-kursoj ankaŭ en la mezlernejoj *Lanlin* kaj *Qingtian* antaŭ kelkaj jaroj, kie lernas lernintoj de *Dongfang*. *Liuguojun* Profesia kaj Teknika Kolegio, Turisma kaj Komerca Kolegio, Informa kaj Teknika Kolegio, kaj *Jiangsua* Teknologia Universitato en *Changzhou*, kie ĉie lernas parte de lernintoj de *Dongfang*. Nia nuna oficejo de CZEA situas en la Universitato. Nia Esperantomovado havas bonan disvolviĝon en la pedagogia Kampo.

*Verda Majo: HASEGAWA Teru.

Kurantaj Vortoj

医療崩壊 kolapso (disfalo) de sansistemo
 陽性 pozitiva、陰性 negativa
 緊急事態宣言 deklari krizstaton
 PCR 検査を受ける
 ekzameniĝi per PĈR (polimeraza ĉen-reakcio)
 物理的距離をとる fizika distancigo
 流行の終息 finiĝo de la epidemio



①同省はコロナウイルスの検査を検討した。

【訳例 1】 La ministerio projektis teston de kronviruso. (Ivajo)

【訳例 2】 La ministerio pripensis teston por kronviruso. (Eiko)

「同省」は la ministerio (その省) でいいでしょう。「同」は前に挙げたものを再び繰り返す場合にも用います。「厚生労働省」は、la Ministerio pri Sano, Laboro kaj Bonfarto や、短縮形 la Bonfarta Ministerio で表現できますが、エス文が長くなるので「同省」にしました。省庁名などの例は、広高正昭さん (Vastalto) のサイトに NUN-vortoj (分野別時事日本語エスペラント用語集) があります。

「コロナウイルス」は kronviruso、koronaviruso で表現できます。koronaviruso は、アカデミオが非推奨としています。新型コロナウイルス感染症は WHO で COVID-19 (2月11日の報告書) ですが、エスペラント化した KOVIM-19 もあります。

「検討する」は、よく調べて、それでいいかどうかを考えるという意味です。konsideri ion (考慮する)、pripensi ion (熟考する) などが考えられます。訳例 1 の projekti は、計画する、立案するという意味で、単語としては外れるかもしれませんが、題意を伝えていると思います。また konsideri には取り入れるべき決定として注目する、検討するという意味もあるので使ってみてはどうでしょうか。

②検査が陽性であれば、その人は感染している。

【訳例 1】 Se la testo estas pozitiva, la persono estas infektita. (CA)

【訳例 2】 Se la rezulto de la testo estas pozitiva, la testita homo estas infektita. (Haveno)

【訳例 3】 Se la testo estas pozitiva, la persono infektigas. (Drako)

「検査」は testo (テスト、検査) でいいでしょう。陽性は pozitiva (肯定の、正の、陽の) です。陰性なら negativa (否定の、負の、陰の) です。なお「検査する」は testi ion/iun で、一定の手順で能力などを評価することです。「感染」については infekti (感染させる、うつす) から、infektita (感

染した) や infektiĝi (感染する) が考えられます。訳例 2 は題意を明確に表現しています。

この場合の se (もしも) は、常に成り立つ因果関係と考えられるので、動詞には現在形を使います。仮定法 us を使うのは、事実と反する場合です。

③日本では 900 以上の感染が確認されている。

【訳例 1】 En Japanio, infekto de pli ol 900 homoj estis konfirmita. (Eiko)

【訳例 2】 En Japanio pli ol 900 infektoj estis konfirmitaj. (AG) ⇨ 解説

【訳例 3】 En Japanio pli ol 900 personoj estas konfirmitaj pozitivaj. (CA) ⇨ 解説

【訳例 4】 En Japanio pli ol 900 da infektitoj estas konfirmataj. (Haveno) ⇨ 解説

「確認する」は konfirmi ion が使えるでしょう。oni を主語にして動詞のまま使ったり、訳例のように形容詞として使ったりすることができます。この課題には過去形での解答が半数ありましたが、現在形の方がいいと思います。

訳例 2 の infektoj は infektitoj の方が良さそうです。訳例 3 は受動分詞形容詞による構文例ですが、pozitivaj の前に kiel を入れる方が分かりやすいのではないのでしょうか。

訳例 4 で数詞の後の da は不要です。da の前には数詞以外の数量を表す語を置きます。つまり cent homoj, cento da homoj のような使い分けです。それと konfirmi は点動詞なので、konfirmitaj を使う方が良いでしょう。

④彼らはウイルス検査なしで仕事に復帰した。

【訳例 1】 Ili revenis al siaj laboroj sen virusa testo. (ikona)

【訳例 2】 Ili rekomencis labori sen kronvirusa testo. (CA)

【訳例 3】 Ili revenis al sia laborejo sen testo pri kronviruso. (AG)

「ウイルス検査」は virusa testo や testo por la viruso などで表現できるでしょう。「なしで」は sen (~なしに) を使います。kun (~とともに) を使うと混乱します。この前置詞は sen diri ion (何かを言うことなしに) のように動詞にも付加できます。「復帰する」には reveni (帰る) のように接頭辞 re を使うことが考えられます。

成績は p.14、新しい課題は p.15

新型コロナウイルスが全世界に流行している。
感染症の大流行は過去に何回も人類に甚大な被害
を与えているが…

La nova koronaviruso disvastiĝas tra la mondo. Multaj homoj timas infektiĝi kaj vivas kun maltrankvilo.

Tiaj infektaj malsanoj multajn fojojn okazis en la pasinteco kaj kaŭzis grandajn damaĝojn al la homaro.^{noto 1}

En Japanio, variolo^{noto 2} propagiĝis en la 8-a jarcento, *Nara*-epoko. Estas taksoj, ke 1–1,5 milionoj da homoj, 25–35% de la tuta loĝantaro de Japanio, mortis pro la infekto. *Manjooŝuu* havas kelke da utaoj pri iu sendito al *Silla*^{noto 3}, kiu mortis pro ĉi tiu variolo. Li mortis ĉe la insulo *Iki* en *Genkai*-Maro en nordo de *Kjuuŝuu*, kiu situas inter *Kjuuŝuu* kaj *Cuŝima*.

Kiel sendito
d' imperiestro fora,
al Sud-Korei'
trans maro vojaĝis vi.
Ĉu familioj
ne atendus sincere?
Ĉu vi mem eble
ne estus atentema?
"Aŭtuno venos,
mi revenos sendube."
al via kara
patrin', vi tute diris
Pasis tempoj kaj
pasis monatoj kelkaj.
"Revenas hodiaŭ,
aŭ vi revenos morgaŭ."
Familianoj
sopiras al la reven'.
Al la fora land'

ankoraŭ ne alvenis.
De *Jamato* vi
tre malproksime iris.
Roka kaj ŝtona
Insul' sovaĝa, tie,
vi ripozis dumvojaĝ'.

(la 3688-a utao en la 15-a volumo)

Malgraŭ la epidemio de variolo, la budhisma kulturo prosperis poste, inkluzive de la konstruado de la Granda Budhostatuo ĉe *Toodaiĝi*-Templo kaj produktado de diversaj majstraj budhostatuoj ktp.

Kiuj sociaj ŝanĝoj okazos post la disvastiĝo de ĉi tiu koronaviruso-epidemio? Ĉu nova kulturo okazos kaj prosperos?

noto 1:

Vidu sekvan retpaĝon por delatoj de epidemio

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Epidemio>

noto 2:

Kontaĝa kaj epidemia infekta malsano, kaŭzata de viruso kaj kun grava prognozo, karakterizata de febro kaj de erupcio de pustuloj, kiuj sekiĝas, postlasante krustojn kaj fine cikatrojn (variolmarkojn): en 1978 OMS deklaris variolon malaperigita de la terĝlobo.

(cito: Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto)

noto 3:

Silla (ĉinlitere 新羅) estas nacio en la sud-orienta parto de la antikva Korea Duoninsulo. (57 a.K.-935 a.K.) Post la paralela epoko kun *Gogurjeo* (ĉinlitere 高句麗) en la norda parto de la Korea Duoninsulo kaj *Baekĵe* (ĉinlitere 百濟) en la sudokcidenta parto de la Duoninsulo, meze de la 7-a jarcento, la suda parto de la Korea Duoninsulo estis preskaŭ unuigita. La potenco de la lando malfortiĝis per civila milito kaj malsatego, kaj ĝi kapitulacis al *Gorjeo* (ĉinlitere 高麗) kaj detruigis.

※原稿の中の万葉集の1首は、4月21日に発行した奈良エスペラント会の会誌“Kornumo”に掲載した歌を一部修正したものです。

Duolingo 日本語版エスペラントコース の実現に向けてご協力ください

福田 誠 (大阪府)

語学学習アプリ Duolingo には、23 の言語使用者向けに 94 の学習コースがあり、3 億人が登録している世界最大の語学学習ツールです (2019 年 11 月時点)。英語、スペイン語、ポルトガル語の 3 つの言語から学べるエスペラント学習コースがあり、登録者数合計は、約 72 万人です。さらにフランス語版と中国語版も目下制作準備が進んでいます。日本語で学べるコースには、英語と中国語があり、それぞれ登録者数は 122 万人と 9 万人弱です。アプリに表示される広告からの収入でコストを賄い、ボランティアがそれぞれの言語版の制作に携わるというシステムにより、無料で学べるようになっています。


Duolingo 日本語版エスペラントコースの制作は、最も効果的なエスペラントの普及活動であることは疑いの余地がありません。日本のエスペ란ティストの幾人かがここ数年 Duolingo 側に日本語版制作の提案を行っていますが、まだ具体的な計画は明らかになっていません。より多くの日本のエスペランティストが Duolingo 側に投げかけていくことが必要です。なお、登録くださったすべての方に制作業務をお願いするわけではありません。署名に協力という感覚でも大歓迎です。

さて、ここからは具体的なやり方に入っていきます。Duolingo は、Web ブラウザー版、つまりパソコンで学習する方法の他に iPhone やスマホで学習ができるよう、iOS 版、Android 版もあります。iOS 版、Android 版の場合は、アプリをインストールする必要があります。Web ブラウザー版、スマホアプリともにユーザー登録が必要です。英語でエスペラントを学ぶコースは、英語の復習になります。日本語で英語を学ぶコースは、実際に日本語版エスペラントコースの制作作業のイメージをつかむために役立ちます。英語以外ということであれば、中国語を学ぶコースを選択するのもよいでしょう。学習言語を選び、試して

ください。次にパソコンの Web サイト <https://incubator.duolingo.com/> からコントリビューター登録を行います。写真のように左の COURSES TEACHING のところに Esperanto、FOR SPEAKERS OF のところには、Japanese を選んでください。現在、この組み合わせのコースはありませんので、Apply to Contribute という表示が現れます。そこをクリックすると、登録画面に移ります。①から⑥の項目があります。①には、先ほどの組み合わせ Esperanto と Japanese が旗とともに表示されています。その下の Willing to become a Gold Contributor? の欄をチェックする必要はありません。②では、Japanese にチェックを入れてください。③には、コントリビューターとしての抱負などエスペラントで作文をしてください。④には、その日本語訳を書きます。⑤には、ご自身のメールアドレスを入れてください。お間違いのないように願います。最後の⑥は年齢確認 (13 歳以上) ですので、チェックを入れてください。記入が完了すると、Submit の表示が浮き上がります。そこをクリックすると、Duolingo に内容が送信され、⑤で登録のアドレスに Duolingo から自動応答メールが届きます。以上で登録完了です。

Duolingo が日本語版の制作を決定すると、エスペラント学習教材データが届きます。Gold Contributor が日本語訳を入れていく作業をそれぞれのコントリビューターに出来る範囲で振り分け、分担して行います。一から教材を制作していくわけではありません。

ご協力に感謝いたします。



El “Rakontaro Genĝi”, 11-a jarcento

21 Dancistinoj – Wotome – (3)

源氏物語 第21帖 少女をとめ

eljapanigis belmonto

3) la ceremonio doni studentonomon

Oni okazigis la ceremonion doni ĥinstilan studentonomon al Vespera Nebulo, ĉi-foje en la orienta domo de *Nideŭvin*. Oni instalas lokon ĉe la orienta alo. *Kamdatimoj* kaj *ufebitoj* multe venis ‘*ankaŭ mi, ankaŭ mi*’, por spekti la ceremonion kiel la maloftan interesplenan vidindaĵon. Vidante la kolektiĝintajn altrangulojn, la profesoroj de la universitato devus nepre ŝanceliĝi. *Genĝi* diris al ili:

“Sen hezito faru la ceremonion laŭ la precedenco, nenion neglektante, en strikta maniero.”

Do, la profesoroj afektis sin ne ŝancelita. Kvankam la vestoj pruntitaj de ekster siaj domoj ne harmoniis kaj ŝajnis malbelaj, la kleruloj eĉ ne sentis honton, kaj vice sidiĝis en impona etiketo, ne vidita ĝis tiam, kaj ili afektis sin majestaj en fizionomio kaj elparolo. Junaj nobeloj ne povis elteni ekridadon. Fakte oni elektis tiujn, kiuj ne facile ridas, kaj pli aĝajn kaj stabilajn; tiujn oni regalis per sakeo, tenante verŝilon aspektantan kiel birdokolo. Ĉi-foja festeno estis alispeca ol ordinara, kaj tial la Dekstra *Dajŝaŭo*, la Estro de la Civitana Fako kaj aliaj prenis taseton da sakeo sen singardado; tion la profesoroj tre severe kritikis kaj riproĉis.

“Ĉiuj regalatoj estas treege maletiketaj. Ĉu vi servas en la kortego eĉ sen kono pri mi tiel fama en reputacio!? Tute absurde.”

Ĉiuj eksplodis per ridoj, aŭdante la vortojn. Li daŭrigis:

“Tro brua! Silenton! Tute maletikete. Iru for de viaj seĝoj!”

Ankaŭ tiaj minacaj vortoj estis interesaj. Homoj, kiuj malofte spertis ĉi tiun ceremonion, rigardis la scenon strange interesa. La *kamdatimoj*, kiuj diplomiĝis de la universitato, 2020.6

字(あざな)つくることは、東(ひむがし)の院にてしたまふ。東の対(たい)をしつらはれたり。上達部(かむだちめ)殿上人(てんじゃうびと)、めづらしくいぶかしきことにして、我も我もと集(つど)ひ参(まゐ)りたまへり。博士(はかせ)どももなかなか臆(おく)しぬべし。

「憚(はばか)るところなく、例あらむにまかせて、なだむることなく、きびしう行(おこな)へ」

と仰(おほ)せたまへば、しひてつれなく思ひなして、家より外(ほか)にもとめたる装束(さうぞく)どもの、うちあはずかたくなしき姿なども恥なく、面(おも)もち、声(こゑ)づかひ、むべむべしくもてなしつつ、座(ざ)につき並びたる作法(さほう)よりはじめ、見も知らぬさまどもなり。若き君達(きむだち)は、え堪(た)へずほほ笑(ゑ)まれぬ。さるはもの笑ひどすまじく、過ぐしつつ、しづまれるかぎりをと選(え)り出だして、瓶子(へいじ)なども取らせたまへるに、筋異(すぢこと)なりけるまじらひにて、右大将、民部卿(みんぶきやう)などの、おほなおほな土器(かはらけ)とりたまへるを、あさましく咎(とが)め出でつつおろす。

「おほし垣下(かimoto)あるじ、はなはだ非常(ひざう)にはべりたうぶ。かくばかりの著(しるし)とあるながしを知らずしてや、朝廷(おほやけ)には仕(し)うまつりたうぶ。はなはだをこなり」

など言ふに、人々みなほころびて笑ひぬれば、また、「鳴(なり)高し。鳴やまむ。はなはだ非常(ひざう)なり。座を退(ひ)きて立ちたうびなん」

など、おどし言ふもいとをかし。見ならひたまはぬ人々は、めづらしく興(きよう)ありと思ひ、この道より出で立ちたまへる上達部などは、したり顔にうちほほ笑みなどしつつ、かかる方ざまを思し好みて、

fiere ridis kun ĝojo, kaj estimis *Genĝi* senfine, ke li ŝatis ĉi tiun fakon kaj decidis trejniasian filon laŭ ĉi tiu vojo. Dume la profesoroj malpermesis la gastojn diraĉi eĉ malmulte, kaj riproĉis la *kamdatimojn* pro la malĝentileco. Post la vesperiĝo fizionomioj de la skoldantaj kleruloj ŝajnis aŭ komikaj aŭ mizeraj sub ete ekbrilanta lumo de lumigiloj. La atmosfero estis certe malsama ol normala sceno, kaj eĉ sentiĝis eksterordinara. La Ministro *Genĝi* diris:

“Mi estas senorda kaj rigida persono kontraŭ plibonigo. Mi estos skoldata per laŭta voĉo.”

Tial li kaŝis sin malantaŭ la vandokurteno, tra kiu li rigardis la festenon. La nombro de la metitaj seĝoj havis limon, pro kio multaj studentoj devis forlasi la lokon, ne povinte preni sidejon. *Genĝi* priaŭdis tion kaj restigis ilin invitante al la surlageta friskodomo, kaj speciale disdonis donacojn.

4) poemkunsido

Genĝi invitis la profesorojn kaj la klerulojn, forirontajn fininte la ceremonion, kaj havis kusion elfari ĥinstilan poemon. Li alvokis kaj aligis ĉiujn talentajn personojn el la *kamdatimoj* kaj la *ufebitoj*. La profesoroj laboris por elfari poemon kun kvar rimoj¹, kaj aliaj ordinaraj homoj por kvarlinia poemo². La profesoro de la literaturo elektis unu linion el poemo, kaj donis al ili kiel la temon. La punkto estis mallonga en la sezono, kaj la verkoj estis laŭte voĉlegitaj post la matenlumiĝo. La Maldekstra *Tiŭbeno* servis por tio. Li estis belaspektulo kaj legis la elfaritajn poemojn en la digna voĉo ĝis soleno, tre sorĉe. Li estis la elstara profesoro. Iliaj verkoj temis pri la juna *Vespera Nebulo*, kiu naskiĝis en la nobela familio, nature ĝuinda la gloron de la socio, sed kiu dediĉis sin en pena studado, kvazaŭ en lumeto de lampiroj aŭ en brileta neĝo sur arbobranĉoj. Ili laŭdis lin per ĉiuj metaforoj. (daŭrigota)

*1 Tiustila poemo konsistas el 8 linioj kun 5 literoj en linio, kaj havas 4 rimojn. 律詩.

心ざしたまふがめでたきことと、いとど限りなく思ひきこえたまへり。いささかも言ふをも制(せい)す。なめげなりとても咎(とが)む。かしがましようののしりを顔どもも、夜に入りては、なかなか、いますこし掲焉(けちえん)なる灯影(ほかげ)に、猿樂(さるがう)がましくわびしげに人わるげなるなど、さまざまに、げにいとなべてならず、さま異(こと)なるわざなりけり。大臣(おとど)は、

「いとあざれ、かたくななる身にて、けうさうしまどはかさねん」

とのたまひて、御簾(みす)のうちに隠れてぞ御覧(み)ける。数定まれる座に着きあまりて、帰りまかづる大学の衆どもあるを聞こしめして、釣殿(つりどの)の方(かた)に召しとどめて、ことに物など賜(たま)はせけり。

事果ててまかづる博士(はかせ)、才人(さいじん)ども召して、またまた文作(ふみつく)らせたまふ。上達部殿上人も、さるべきかぎりをば、みなとどめさぶらはせさせたまふ。博士の人々は四韻(しゐん)、ただの人は、大臣(おとど)をはじめたてまつりて、絶句(ぜく)作りたまふ。興ある題の文字選(え)りて、文章博士奉る。短きころの夜なれば、明けはててぞ講(かう)ずる。左中弁講師(かうじ)仕うまつる。容貌(かたち)いときよげなる人の、声(こゑ)づかひものものしく神さびて読みあげたるほど、いとおもしろし。おぼえ心ことなる博士なりけり。かかる高き家に生(む)まれたまひて、世界の栄華(えいぐわ)にのみ戯(たはぶ)れたまふべき御身(みみ)をもちて、窓の螢(ほたる)を睦(むつ)び、枝の雪を馴(な)らしたまふ志(こころざし)のすぐれたるよしを、よろづの事によそへなずらへて心々に作り集めたる、

(つづく)

*2 Tiustila poemo konsistas el 4 linioj kun 5 literoj en linio, kaj havas 2 rimojn, aŭ el 4 linioj kun 7 literoj, kaj havas 3 rimojn. 五言絶句, 七言絶句.

関西エスペラント大会延期のお知らせ

第 68 回関西エスペラント大会は、6 月 13 日、14 日開催を予定していましたが、新型コロナウイルスの影響により、実行委員会で検討の結果、11 月 14 日（土）、15 日（日）に延期することにいたしました。

誠に恐縮ですが、事情ご賢察くださり、大会成功にご支援のほど、よろしく願い申し上げます。

延期による変更については、これから詰めますが、今お知らせできることを以下に記します。

日時：11 月 14 日（土）、15 日（日）

会場：高槻現代劇場（そのまま）

1. 参加費などの扱い

すでに申し込んでいただいた参加費などはそのままお預かりします。

参加費払い戻しをご希望のかたには申しわけございませんが、払込手数料をご負担いただき送金いたします。

延期に伴い参加費の割引期限を延長します。

②一般参加料 4 月末まで → 9 月末まで 4000 円

③一般参加料 5 月以降 → 10 月以降 4500 円

2. 番組の変更、各種の申込期限などについて

延期によって番組の変更が生じると思われます。幸いなことに公開番組については、日時変更後も高槻の名誉市民を語り継ぐ会会長の馬淵晴彦さんと野田淳子さんが出演を引き受けてくださることになり、「映像で振り返る高槻達之助」「野田淳子さんが歌う命の

歌、心の歌」を予定通り行います。

中国の常州市と高槻市の交流について講演していただく中国からの招待者、張常生 (Zhang Changsheng) さんの来日は、11 月に可能になるのかどうか見通せませんので、今のところ未定です。

また、Bankedo (懇親会) は、予定していたレストラン錦松鶴が新型コロナウイルスの影響で廃業したため、中華菜館桃莉高槻店 (高槻市総合センター 15F) に変更しました。

大会前遠足、弁当、分科会、懇親会、Gaja vespero などの申込期限が変更になります。今後、実行委員会で検討して大会ホームページ (KLEG ホームページ内)、機関誌 La Movado などでお知らせします。

3. 大会記念品について

大会記念品の夏目漱石著『門』のエスペラント訳は土居智江子さんの翻訳が終わり、現在見直し、校正をしているところです。そして延期前の関西大会にあわせ発行する予定で進めています。完成すれば 11 月の関西大会を待たず、参加申込者にお送りします。

4. お問い合わせ、連絡先

お問い合わせ、疑問点などは下記にご連絡ください。
第 68 回関西エスペラント大会実行委員会

〒561-0802 豊中市曾根東町 1-11-46-204

関西エスペラント連盟 気付

電話：06-6841-1928、ファクス：06-6841-1955

メール：kek68a@gmail.com

初心者のための

語尾なし単語の使い方 (88)

相川 節子

相関詞 (21) **kie** (続き)

ほかの *ki-vortoj* 同様、*kie* も関係詞として使われます。*kie* の場合、正確には関係副詞ということになります。

Mi vizitis la urbon, kie mi naskiĝis.

(私は自分が生まれた町を訪ねた)

La loko, kie estis mia domo, nun estas herbejo.

(私の家があった場所は、今草地になっている)

以上 2 例は、名詞を *kie* で受けています。この *kie* は *en kiu loko* と言い換えることができます。

Atendu tie, kie staras la verda flago.

2020.6

(あの緑の旗が立っている場所で待っててください)

La hundo kuris tien, kie staras alia hundo.

(その犬は、ほかの犬が立っているところに向かって走った)

Fariĝis granda kavo tie, kien la meteoro falis.

(隕石が落ちたところに、大きな穴ができた)

これら 3 例は、*tie* と *kie* の組み合わせですが、意味によって「移動の対格語尾」がどちらか、あるいは両方に付くことがあります。

先行詞に当たる *loko* あるいは *tie* が省略されることもあります。次の例文は、ザメンホフが編集したことわざ集から。

Fadeno iras, kien kudrilo ĝin tiras.

(針が引っぱるところへ糸はついていく)

WEB サイト拝見 (4)

かって「芦屋エスペラント会」があった…

芦屋エスペラント会が60年を超える歴史を閉じて解散したのは2014年でした。会は解散しても、サイトは残っています。残っているだけでなく、元代表者である津田昌夫さんの手で日々更新されているのです。

エスペラントのいろいろな本が紹介されています。小説が中心ですが、本そのものの紹介だけでなく、内容の解説や単語の説明など、エスペラント会の例会で指導者に教わっているような気持ちになります。「今日の単語」は休日をのぞいて毎日更新されています。このサイトを毎日のぞいて、おなじみの単語の使い方を確認したり、新しい単語を覚えるのもいいですね。

La Revuo Orienta や La Movado に掲載された、読書案内の再録もあります。シャーロック・ホームズのシリーズやメグレ警部もののように、自分が知っている本を改めてエスペラントで読むのも楽しいし、エスペラント

トでしか読めない原作物に挑戦するのもいい。読書の水先案内人として、このサイトを利用してはいかがでしょう。

[管理者からのコメント]

友人からダサイレイアウトだと言われます。でも、エスペラント文中に出てくる単語を毎日一つずつ登場させ、その単語がどのように使われているかを知る助けになり、管理者が更新しやすい画面なら、*La Movado* 832

サくても構わないと考えています。転居に伴いアドレスを2回変更しているため、現今のコロナ騒動の長い休みなどを利用して「Esp 図書を読む」などの、切れてしまったリンクを少しずつ修復するつもりです。

書評

日本エスペラント運動の裏街道を散歩する — 「人物」がつづる運動の歴史

小林司、萩原洋子、エスペラント国際情報センター、
2017年、164p 1000円

伊藤 俊彦（愛知県）

この原稿を書いている4月下旬現在、新型コロナウイルスの感染拡大に伴って全都道府県に緊急事態宣言が発令されており、われわれはこれまでに経験したことのない事態に直面している。日本だけのことではない。パンデミックがいつ収束するかの見通しはつかず、エスペラント関係に限っても、モントリオールで開催される予定だった世界エスペラント大会は再来年に延期されたし、その他の大会やイベントの開催にも暗雲が垂れ込めている。

のっけから書評とは関係のない話題になったが、そうした状況のもとで本書を読み返してみると、さまざまな思いに誘われる。本書はサブタイトルにあるように、個々の人物に焦点をあてて運動の歴史をたどったものであり、多くのエスペランティストたちの人となりを生彩に満ちた筆致で描き出している。しばらく前に私はEd Borsboomの“Kie miozotas memor” (Internacia Esperanto-Instituto、2017) について書いたことがあるが、そこではエスペラントに人生をささげた有名無名の個人の人生が深い共感とともに語られていた(本誌2018年7月号)。本書もまた、エスペラントがそれぞれの人たちの生き方と深く結びついていることを実感させる。そうして困難な時代に個人がいかにかそれに対処したかが語られている。

個人を超えた大きな力がはたらくとき、それが自然であれ国家権力であれ、個人はいかにも無力である。それでも、彼あるいは彼女が、先の見えない困難のなかで命をかけて権力に抗うさまが本書では描かれていて感動的である。関東大震災の直後に甘粕正彦大尉ら憲兵によって虐殺された大杉栄、弾圧のなかでプロレタリア・エスペラント運動を担った人々、兵役拒否をした石賀修、ローマ字化運動のさきがけとなった斎藤秀一、中国にあって日本の中国侵略を批判し続けた長谷川テル、1930年代のファシズム期に発行された雑誌tempoの編集者で二度も検挙された野島安太郎、アメリカが押し進めるベトナム戦争に対する佐藤政権の加担に抗議して焼身

自殺をとげた由比忠之進。そうした人々が本書には次々に登場する。

他方、エスペラントに深い共感を示した知識人たちも取り上げられている。黒板勝美、丘浅次郎、吉野作造、柳田國男、新渡戸稲造など、必ずしも「運動」に直接的に関わった人ばかりではないが、近代日本の思想史をいどった人物たちが活躍する。裏街道といいながら、多年にわたって日本エスペラント運動の牽引車であった小坂狷二にも一章が当てられている。また、北一輝やエスペラント報国同盟についての記述もあるなど、きわめて多彩で目配りがきいている。

『日本エスペラント運動人名事典』(柴田巖、後藤齊編、峰芳隆監修、ひつじ書房、2013年)は、有名無名の人物の事績を、資料を博搜して記録した画期的な事典である。また、“Nia diligenta kolegaro” (Halina Gorecka, Aleksander Korjenkov 著、Sezonoj, Litova Esperanto-Asocio、2018年)も200人の卓越したエスペランティストの年譜や業績を記録したものであり、大いに有益であるが、本書はそれらを読むのとはまた違った、読物としての興味と発見がある。

本書のもととなった文章は、1975年4月号から77年4月号にかけて雑誌「エスペラントの世界」に連載され、40年を経て復刊された。著者のひとり小林司氏は、1972年1月号から75年3月号まで、日本エスペラント学会(当時)の機関誌La Revuo Orientaの編集長を務め、ザメンホフ研究の新しい動向などを精力的に紹介して、当時エスペラントを始めたばかりの私も大いに刺激を受けたことを思い出す。編集長を退任直後に本書のもととなる連載を始められたということになり、当時の精力的な活動がうかがわれる。

最後に、私事ながら本書を読んで思い出したことを記しておきたい。大杉栄とともに殺された甥の橋宗一少年(当時8歳)の墓が名古屋市の覚王山日泰寺墓地にあって、何年か記憶にないが、小雨の降るなかを坪田幸紀氏と同行して訪れたことがある。墓石の裏には、父の惣三郎により「大正12年(1923)9月16日ノ夜 大杉栄 野枝ト共ニ犬共ニ虐殺サル」という血を吐くような言葉が刻まれていた。その拓本が同氏の『葉こそおしなべて緑なれ…』に掲載されている(リバーロイ社、1997年、p151)。その坪田氏も亡くなって10年になろうとしている。

Pluvas longe (雨)

muz. HIROTA Ryuutaroo(1892-1952), poez. KITAHARA Hakusyuu(1885-1942), trad. SIMATANI Takesi



1)Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
 2)Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
 3)Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
 4)Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.
 5)Plu - vas kaj plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.



Res - ti hej - me de - vas mi, ĉar man - kas nun omb - rel'.
 Ne eks - te - re, sed mi hej - me lu - du sen omb - rel'.
 Kri - as jen fa - za - no e - ta, nu - da sub ĉi - el'.
 Dum mi en - dor - mi - gas pu - pon, plu - vas de l' ĉi - el'.
 Plu - vas ta - ge, plu - vas nok - te. Plu - vas de l' ĉi - el'.



De san - da - lo jam ŝi - ri - ĝis ru - ĝa ri - me - net'.
 Fal - du mi fi - gu - ron be - lan el ko - lor - pa - per'.
 Fros - tas al fa - za - no nun mal - ga - ja la ve - ter'.
 Jam for - bru - lis ĉi - u art - faj - ra - ĵo sub a - ler'.
 Plu - vas ĉi - am, plu - vas lon - ge. Plu - vas de l' ĉi - el'.

雨 (あめ)

作詞 北原白秋 (1885-1942)

作曲 弘田龍太郎 (1892-1952)

- 1) 雨がふります 雨がふる
遊びにゆきたし 傘はなし
紅緒 (べにお) の木履 (かっこ) も緒 (お) が切れた
- 2) 雨がふります 雨がふる
いやでもお家で 遊びましょう
千代紙 (ちよがみ) おりましょう たたみましょう
- 3) 雨がふります 雨がふる
けんけん小雫子 (こきじ) が 今啼 (な) いた
小雫子も寒かる 寂しかる
- 4) 雨がふります 雨がふる
お人形寝かせど まだ止まぬ
お線香花火も みな焚 (た) いた
- 5) 雨がふります 雨がふる
昼もふるふる 夜もふる
雨がふります 雨がふる

Pluvas longe

muz. HIROTA Ryuutaroo

poez. KITAHARA Hakusyuu

tradukis SIMATANI Takesi

- 1)Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Resti hejme devas mi,
ĉar mankas nun ombrel'.
- 2) Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Ne ekstere, sed mi hejme ludu sen ombrel'.
- 3)Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Krias jen fazano eta, nuda sub ĉiel'.
- 4)Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Dum mi endormigas pupon, pluvas de l' ĉiel'.
- 5)Pluvas kaj pluvas longe. Pluvas de l' ĉiel'.
Jam forbrulis ĉiu artfajraĵo sub aler'.

Epidemio iras tra la mondo

AIKAWA Setuko (Kioto)

Nova viruso

Kronviruso (alinome koronaviruso aŭ koronaviruso) estis malkovrita jam en 1960-aj jaroj kiel kaŭzanto de ordinara malvarmumo.

Poste oni trovis, ke kelkaj specoj de kronviruso kaŭzas gravan pulmiton (肺炎). Unu estas viruso de Sasoso (severa akuta spira sindromo), angle *SARS (severe acute respiratory syndrome)*. Ĝi estis trovita en 2003 kaj kaŭzis seriozan pulmiton en Azio kaj Norda Ameriko. Alia estas viruso de mezorienta spira sindromo, angle *MERS (middle east respiratory syndrome)*, kiu estis trovita en 2012.

La tria estas la nova kronviruso, kiu kaŭzas simpton similan al malvarmumo kaj foje okazigas gravan pulmiton. La malsano kaŭzita de la nova kronviruso estas nomata KOVIM-19 (kronvirusa malsano 2019, angle *COVID-19*). En la nomo estas nombro „19“, ĉar la viruso estis trovita en 2019.

Ĝenerale pulmiton kaŭzas diversaj mikroboj: bakterio, mikoplasmo kaj viruso. Ĉiu el ili estigas inflamon ĉe pulmo. Plej ofta estas pulmito kaŭzita de *Streptococcus pneumoniae* (肺炎球菌), speco de bakterio. Kontraŭ tiu bakterio oni feliĉe havas vakcinon.

Sed kontraŭ pulmitoj pro viruso ankoraŭ ne ekzistas vakcino. Oni esperas, ke la esploristoj sukcesos prepari efikan vakcinon kontraŭ la nova kronviruso en proksima estonteco.

De Ĉinio al aliaj landoj

La malsano estis trovita en la lasta decembro en la urbo *Uhan* en Ĉinio. Oni trovis, ke iuj kazoj de pulmito okazas pro nova speco de viruso.

La malsano baldaŭ disvastiĝis eksteren: al aliaj regionoj en Ĉinio, al aziaj landoj, al Eŭropo, al Usono...

Al Japanio la epidemio venis en januaro 2020. En la komenco oni povis sekvi, laŭ kiuj 2020.6

kanaloj la viruso venis: ekzemple vojaĝanto el Ĉinio veturis per buso por turismi en Japanio, kaj infektiĝis la ŝoforo kaj la ĉiĉerono de la buso. En alia kazo festeno en dometo sur boato kaŭzis infektiĝon de ĉeestantoj.

En februaro oni trovis kazon, kies infakta kanalo ne estis klara. Tiaj kazoj pli kaj pli multiĝis.

Esploristoj poste malkovris, ke al Japanio venis la epidemio ne nur rekte el Ĉinio, sed ankaŭ pere de eŭropaj infektitoj. Supozeble japanoj vojaĝintaj en Eŭropo enportis viruson.

Diversaj okazaĵoj senprecedencaj

En la 27-a de februaro la ĉefministro *Abe Shinzo* deklaris, ke la elementaj kaj mezaj lernejoj ne havu lecionojn. Tio estis abrupta ne nur por la popolo, sed ankaŭ por aliaj ministroj kaj specialistaro, kiu donadis konsilojn al la registaro. Kvankam la deklaro ne estis deviga, preskaŭ ĉiuj lernejoj sekvis ĝin. Okazis diversaj konfuzoj kaj en la lernejo kaj en la familioj de la lernantoj. Ĝis tiam foje okazis, ke iuj lernejoj estis fermitaj pro gripo, sed neniam samtempe en la tuta lando.

En la 7-a de aprilo la registaro deklaris krizstaton de la tuta lando. Ankaŭ tio estis senprecedenca. Laŭ la deklaro la guberniaj aŭtoritatoj povas konsili aŭ ordoni nefunkcion de teatro, kinejo, restoracio, vendejo kaj aliaj. Al la popolo agado ekster sia domo, ekzemple kunveno de societo, estas malrekomendita.

Specialistoj kaj la registaro konsilis, ke ĉiuj evitu tri “*密*” por ne infekti kaj ne infektiĝi. La ideogramo “*密*” estas uzata en jenaj vortoj: 密閉 (fermiteco), 密集 (densa kolektiĝo), 密接 (rekta kontakto). “*Restu hejme!*” estas nun furora devizo.

Krizo ekonomia

Epidemio kaŭzas ne nur krizon de sano de la popolo, sed ankaŭ krizon de ekonomio.

Nun en Japanio okazas diversaj malfaciloj ĉe dungantoj kaj dungatoj. Restoracioj, hoteloj, butikoj, vojaĝ-agentejoj, administrejoj de buso

豊中エスペラント会の 読み聞かせボランティア活動

豊中エスペラント会では、高齢の会員を訪ねて La Movado の記事や同会会報を読み上げて聞いてもらう活動を始めた。視力が弱くなった会員や足が弱って例会に行くのが難しい会員が対象。

[←佐野 寛]

[de p.12]

aŭ taksio... nekalkuleblaj estas suferantoj pro manko de klientoj. Eĉ bankroto okazas unu post alia. Nature multaj laboristoj estas maldungitaj.

En la fino de aprilo kaj la komenco de majo oni havas sinsekvajn feriojn en Japanio. La tempo estas nomata "ora semajno". Sed ĉijare oni ne vojaĝas nek turismas, ne vizitas parencojn kaj amikojn. Ekonomie la tempo fariĝas "dolora semajno"!

Influo al Esperanto-Movado

"Restu hejme!" estas sekvata ankaŭ de esperantistoj. Multaj Esperanto-grupoj ĉesis kunveni. Iuj grupoj ne havis jarkunsidon, kiu devus okazi en printempo.

Pluraj regionaj kongresoj en Japanio, kiuj estis okazontaj en printempo kaj somero, estis prokrastitaj.

Anstataŭ fizika kunveno esperantistoj nun komunikas per reto. Skype, Zoom, Whereby, Discord... sistemoj por interreta grupa komuniko nun estas uzataj. Sed ne mamultaj grupoj ne kutimis komuniki per interreta sistemo, kaj reta interparolo ne ĉiam bone iras.

Aliflanke nun estas ŝanco por legi librojn. Legi librojn estas utila maniero por altigi sian kapablon precipe por esperantistoj.

Ĉu la dua kaj tria ondo venos?

En kelkaj landoj la nombro de infektitoj feliĉe malkreskas. Sed neniu scias, ĉu la dua kaj tria eksplodo okazos aŭ ne. Ni nur klopodu en nia ĉutaga vivo, ke ebleco de infektado estu laŭeble malgranda.



Mesaĝo el Ĉeĥio

EGAWA Harukuni (Wakayama)
[komento de la redakcio]

S-ro Egawa ricevis mesaĝon de korespondanto en Ĉeĥio, kiu temas pri la kronviroza epidemio.

Estimata amiko,

ni ĉiuj dankas pro novaĵoj pri KOVIM 19. Ni ĝojas, ke vi kaj via familio estas en ordo. Ankaŭ ni kiel vi deziras aŭskulti pli bonajn raportojn. Jen Esper(ant)o donas kredon pri pli trankvilaj tempoj.

En nia lando la pandemio ne haltas, sed havas limojn. Multaj fabrikoj kaj entreprenoj ne laboras, lernejoj estas vakaj, trafiko nur sporade funkcias.

Homoj estas hejme. Infanoj lernas tra televido kun gepatroj, virinoj kudras buŝkovrilojn, maljunuloj restas hejme kaj junularo portas al ili nutraĵon.

Ekstere krom familioj rajtas promeni nur duopoj. Feliĉuloj kiuj havas ĝardenojn ĝuas aeron. Viglaj estas homoj en interreto. Nekredeble multaj estas skeĉoj, spritaĵoj kaj anekdotoj ankaŭ novaj kantoj kaj versoj. Jes, ĉeĥoj estas ĉiam ridemuloj en mizeraj tempoj.

El Japanio venas informo pri medikamento kontraŭ viruso kaj traktoj de nia registaro pri aĉeto. Laŭ ekzemplo de azianoj niaj homoj portas buŝkovriletojn. Reguloj por homoj ŝanĝas ĉiutage kaj estas homoj, kiuj panikas. Estas interese, ke homoj, kiuj travivis mondmiliton estas pli trankvilaj ol plijuna generacio.

Niaj E-anoj esperas, ke post viruso ĉio revenos, eble en pli bona formo.

Kun deziro de sano kaj plibonigo ni salutas kaj ĝojas pri via venonta letero.

Jindřiška, Marie kaj Blanka

Salono 欄原稿募集

Salono は本誌の投書欄です。長さは原則として半ページ。日本語・エスペラントどちらでも。

Vortkruca enigmo

Anonimulo

Vicigu adekvate 9 literojn trovitajn en la kvadratoj kun steleto. Tiam vi akiros adjektivon, kian staton ni forte deziras en la nuna tempo kun minaco de epidemio.

Sendu la trovitan vorton kiel solvon de la enigmo ĝis la 20-a de junio, paperpoŝte al la oficejo de KLEG, aŭ retpoŝte al <lamovado@gmail.com>.

Rimarko: (x) signifas, ke la vorto ne portas finaĵon. La trovita vorto povas esti ne radiko, sed kunmetaĵo.

1	2	3	4	*		5	6	
7			*		8			9
10					*			*
11		*			12			
		13		14			15	
16	17		*	18		19		
20			21		*	22		
				23				
24		*				25		

Horizontale: 1. Nia monata gazeto.(x) 5. ~a komedio estas japana tradicia teatraĵo.(x) 7. ~u amason de homoj por ne infektiĝi.(x) 8. ~o regas la mondon. 10. Logika dedukta scienco pri kvantoj, formoj kaj aranĝoj.(x) 11. Kioto estas pli proksima al Tokio ~ Hiroŝimo.(x) 12. Oni emas agi nur por ~a profito.(x) 13 Hundo svingas la ~on por esprimi ĝojon.(x) 15. Mi, ~, li, ŝi.(x) 16. Zamenhof havis ~on de intergenta lingvo jam en la infaneco.(x) 18. Plurjara ligneca planto.(x) 20. La griza nubo ~is pluvon. (x) 22. Verko libere esprimanta penson de la aŭtoro.(x) 23. Mallongigo de Komuna 2020.6

Seminario.(x) 24. Tia, ke ĝia uzo, efiko, rezulto estas aŭ povas esti profita. 25. Ĉiuparta.(x)

Vertikale: 1. La libro re-is al mi mian infancon.(x) 2. Havanta proksimume la formon de ovo aŭ elipsoido.(x) 3. Vinberujo.(x) 4. La ĉefurbo de Grekio. 5. Skribi mallonge por ne forgesi. 6. Persona nedefinita pronomo.(x) 8. Posedanto de domo, butikoj kaj aliaj.(x) 9. Malo de oriento.(x) 13. Riski monsumon aŭ valoraĵon pri hazarda rezulto.(x) 14. Pintigita stangeto pafata per arko.(x) 17. Komponaĵo por du voĉoj aŭ du instrumentoj.(x) 19. Ĉiu animalo escepte de homo.(x) 21. Adverbo signifanta "el ia kaŭzo".(x)

La solvo al la aprila enigmo: **MARTELO**

La ĝustan solvon donis 17 legantoj:

濱田 國貞, 山野 敏夫, Sayuri, 島津 泰子, Grebo, CA,

TADA,

松川 まきこ,

前藤 寛,

本田 照美,

平井 倭佐子,

西 千寿子,

にし のりこ,

Kacu,

中村 文雄,

水渡 篤子,

武藤 たつこ

S	I	M	B	O	L		K	E
E	G	A	L		A	N	A	S
M		S	A	L		I	N	T
A	M	A	T	O	R		T	
F	U	Ĝ		T	I	M		A
O	T		S	E	M	A	J	N
R		S	U	R		R	U	S
	V	A	L	I	D		N	
Ŝ	I	N	K		E	F	I	K

Por la marta enigmo s-ro 前藤寛 akurate sendis ĝustan solvon, sed ĝi ne atingis la redakcion supozeble pro malordo en interreta trafiko.

楽しい作文教室 (106) 成績

9人の方から応募がありました。()内は留意事項です。

うん、良いね : CA, Eiko(② se), Ivajo(③時制)。

良いね : ikona(②仮定法?), Haveno(③ da, ata?), AG(③時制), Celejo(②仮定法?), 水渡(②仮定法? ③ konstadis), Drako(①, ③綴り)。

KLEG 事務局だより

★ 新型コロナウイルスによる緊急事態宣言を受けて、KLEG 事務所の当直態勢を変更しています。ご用件は、なるべくメール、FAX、電話でお願いします。開館日も変更していますので、KLEG の WEB サイトでご確認ください。

Mikspoto (当欄は敬称略)

★ 4月18日付朝日新聞朝刊「天声人語」に、「アーナキスト大杉栄の場合、獄中の時間の多くを語学に当てた。『一犯一語』を目標に、国際語エスペラントからイタリア語、ドイツ語と続けた」と書かれている。 [←西千寿子]

★ 京都市の NPO 法人が運営する地域 FM 放送「京都三条ラジオカフェ」の番組「正会員だより」に京都エスペラント会が登場。野田淳子が 15 分間のインタビューを受け、エスペラントの説明と、自身がエスペラントの学習を始めたいきさつ、京都エスペラント会の活動を紹介した。 <http://radiocafe.jp/201511001/episodes/2020-4-25oa/> (「ラジオカフェ 正会員だより 京都エスペラント会」で検索可) で聴取できる。野田は番組内で歌を披露したが、著作権の関係でネット上では歌の部分が削除されている。 [←相川 節子]

楽しい作文教室 8月号課題

(6月20日締切)

- ①若者たちの死亡率はそれほど高くない。
- ②新症例は減少しているように見える。
- ③それらの統計は現実を反映しているか。
- ④何ものもこの減少が続くことを証明しない。

(ヒント) 死亡率 *mortoprocento*、症例 *kazo*、統計 *statistiko*、*spiegulo*、*pliiĝi*、*kreski* を調べましょう。日本語の原文の内容が、相手にははっきり伝わるように考えて訳してください。

送付先:

[郵送] 〒674-0092 明石市二見町東二見 515-1-811
塚本 猛

[電子メール] c_tak@esperanto.ne.jp

(件名に「作文」の文字を入れてください)

添削は受け付けておりませんのでご了承ください。

Divenu la vorton!

Jen estas klarigoj pri iuj vortoj en la Plena Ilustrita Vortaro. Divenu, kio estas la kapvorto. La solvoj aperos en la venonta numero.

- (1) Manĝaĵo farita el knedita, fermentigita kaj bakita faruno.
- (2) Vasta etendaĵo de sala akvo, kiu kovras la plej grandan parton de terglobo, ofte kontraste kun la seka tero aŭ la sensala akvo.
- (3) Aparato, konsistanta precipe el mikrofono, aŭdilo kaj komunikiga elektra fluo, kiu ebligas interparoladon je distanco.
- (4) Tia, ke ĉiuj ĝiaj organoj normale funkcias.
- (5) Vivanta nur de relative ne longa tempo.
- (6) Ne perdanta sian memregadon, sian animfirmecon antaŭ danĝero.
- (7) Iri per movoj pli rapidaj ol en marŝo, dum kiuj ambaŭ piedoj periode troviĝas samtempe en la aero.

エスペラント文の中のイタリック体使用について

本誌では、エスペラント文中に他の言語の単語やエスペラント化されていない固有名詞があるとき、原則としてその単語をイタリック体にしていきます。「これはエスペラントの単語ではありません」という目印です。署名記事の場合も同じですが、筆者の意向により違うこともあります。 (編集部)


Vortkruca enigmo の出題を募集します

クロスワードの問題を作ってみませんか。

マス数は 9×9 でなくても可。締め切りはありません。送り先は lamovado@gmail.com、郵送の場合は裏表紙の関西エスペラント連盟の住所へ。

Ankaŭ vi prezentu vortkrucean enigmon!

La nombro de la kvadratetoj povas esti pli aŭ malpli granda. Sendu vian enigmon al la redakcio.



★ 新刊・新着 ★

La flandra hundo 1100円
ネロは憧れのルーベンスの絵の前で愛犬とともに息絶えて……。アニメでおなじみ「フランダースの犬」の原作(Ouida作)。A5変形判、71p。

La krubalo 1000円
森で怪物グラファロに会ってしまったネズミ。さあネズミはどうするのだろうか? ジュリア・ドナルドソンのたのしい絵本。A4変形判、31p。

La momento de vero 2700円
戦争体験に基づいたBogomolovの長編小説。著者はタルコフスキーの映画「僕の村は戦場だった」の原作者として知られる。A5判、451p。

唐丹の海から世界へ 500円
子どもたちと歩んだ9年一東日本大震災被災地・釜石市唐丹の子どもを支援する活動の歩みを堀泰雄がまとめる。日・エス対訳。A4判、32p。

Ne serĉu la murdiston! 1100円
多作な作家Julian Modestの推理小説最新作。偽善や背徳に満ちた社会で起こる犯罪。はたして罪とはなにか。A5判、97p。

★ 深めるエスペラント ★

考えるエスペラント文法 900円
小西岳著。『エスペラント文法の散歩道』に未収録の文法に関する文章を三部に編集して収める。

エスペラント 日本語を話すあなたに 880円
藤巻謙一著。日本語と比較しながらエスペラントを概観する。新しい視点で学ぶエスペラント。

エスペラント単語練習帳 1200円
タニヒロユキ著。基本の1300語を効率よく習得。「英語が得意な人の注意すべき単語」「主な地域名・国名・都市名」等付録も充実。

エスペラントとグローバル化 900円
タニヒロユキ著。「国際と民際」「民際語と積極的中立主義」など《民際語》とはなにかを問う。

★ 在庫から バギーの作品 ★

Aŭtuna foliaro 500円

Ĉielarko 1400円

Pilgrimo 750円

Preter la vivo 750円

Sur sanga tero 850円

La vagabondo kantas 2000円

La verda koro 1000円

Viktimoj 850円

ご注文は郵便、ファクス、電子メールで。送料は実費。現品と一緒に請求書を送ります。支払いは振替口座で。

編集ノート



★ 前号で「Vortkruca enigmo」の出題を募集します」と呼びかけたら、さっそく1件の応募があり、今回の出題に使わせていただきました。

★ 新型コロナウイルスは今月号にも関連記事が複数あります。エスペラント名は百家争鳴ですが、日本語だけは「ウィルス」ではなく「ウイルス」に表記を統一しました。(島谷剛)

発行所:ラ・モバード社 編集:相川節子 発行人:染川隆俊 定価280円 送料63円 1年3800円 送料共本
局:一般社団法人 関西エスペラント連盟内 561-0802 豊中市曾根東町1-11-46-204
電話(06)6841-1928 ファクス専用(06)6841-1955 電子メール:esperanto@kleg.org
振替口座 00960-1-60436 「一般社団法人 関西エスペラント連盟」 ホームページ: <http://www.kleg.org>
九州支局:九州エスペラント連盟内 859-0407 長崎県諫早市多良見町シーサイド2-190 盛脇保昌方 電話(0957)43-4352
中国四国支局:中国四国エスペラント連盟内 771-0371 徳島県鳴門市北灘町榎木字観音面14-1 木谷幸子方 電話(088)688-1098